FN PER ANC 47


# NORMANDA ESPERANTO - BULTENO

BULLETIN [illegible] - [illegible]ATA BULTENO

Nº 30 - DECEMBRO 1974 .



Prizorgas : Maryse + Pierre Lemarchand 43 rue Desseaux 76100 - ROUEN.



Eldonita de la Esperanto - Grupoj el la Ruena regiono.

Sendu la manuskriptojn antaŭ la 10a de februaro - 10a de majo -
10a de aŭgusto - 10a de novembro -

UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE : c.c.p. : ROUEN 283 40 H .

- Por 1975 : Minimuma kotizo 3,00 Fr. Subtenkotizo ek de 10,00 Fr.


## Kaj Vivu l'jaro 75 a !

( Kantu, laŭ ario " Malbrough s'en va-t-en guerre". )

Saluton je l'Novjaro,
Amikin' , kamarad' , kolegaro
Bonfarton, sanon al vi,
Ĉiuj en Normandi'
Por Esperanto ni
Ĉiuj en Normandi' ...

Ĝojano.

## B O N D E Z I R O J . . . .

La estraro de nia U.N.E. komisiis al mi la agrablan taskon prezenti al la legantoj de nia bulteno niajn bondezirojn por 1975.

En la momento kiam malbonanoncantoj antaŭvidas ĉiajn katastrofojn : perfortaj agoj, ekonomia krizo, senlaboreco, tertremoj, militoj, ktp..., ni ne devas malmemori ke ni estas esperantoj.

Ni ja esperas al paco : ne ĉiuj esperantistoj estas pacistoj, sed ĉiuj estas pacemuloj. Multaj el ni havas gekorespondantojn en landoj kiaj Vjetnamio, Israelio kaj Irlando kie homoj suferas pro milito, kaj ni tre deziras por ili renaskiĝon de firma paco. Estas precipe pacema sento kiu incitis Dron ZAMENHOF krei nian lingvon.

Ni esperas ankaŭ al justeco kaj ni deziras ke neniu plu homo mortu pro malsato sur nia planedo.

Ni esperas kompreneble ke la nova jaro estos favora por nia propra idealo kiu celas interhoman komprenon pere de universala lingvo.

Finfine, ni devas esperi ke nia unuiĝo fariĝos pli kaj pli efika kaj sukcesos veki la energion de ĉiuj esperantistoj en nia provinco. Depost la kongreso en GRAND-

.../... – QUEVILLY la estraranoj de U.N.E. kunvenis regule kaj ili starigis labor-planon por revivigi nian UNE kiu estis dormema. Raportojn pri la decidoj de tiuj kun-venoj, vi povos legi en la antaŭa kaj en la nuna bulteno. Ni esperu ke tiuj klopodoj alportos pozitivajn rezultojn.

Dum la jaro 1975, ne okazos oficiala kongreso kun vizito de oficialuloj kaj akcepto de urbestraro sed la estraro decidis kunvoki ĉiujn esperantistojn partopreni laŭstatutan ĝeneralan kunvenon en plena naturo. Tiu kunvenego okazos la 10an kaj 11an de MAJO en VAL de SAÂNE (Centro de Seine Maritime) en domo de Naturamikoj. Tie ni povos amuziĝi sabate vespere, dormi, manĝi kaj diskuti pri niaj problemoj, ĉu ĉirkaŭ la kameno ĉu sub la pomarboj. Ni esperas ke ekde jam vi rezervigos tiun fin-semajnon kiu devus esti agrablega por ĉiuj.

Atendante la plezuron nin tiam retrovi, ni senĉese kaj entuzasme batalu kaj pro-pagandu. La nova jaro kontribuu al nia sukceso. Tion ankaŭ, ni povas esperi .

Petro QUILLAUD.

---

ESTRARKUNVENO de U.N.E. en LE HAVRE la 30an de NOVEMBRO 1974 ĉe Sro GIBAUX .

La estraro de U.N.E. kunvenis je la 14a horo kaj duono.
Je la komenco oni diskutis pri la bulteno, kaj decidis pri la enhavo de la venonta nume-ro, kiu aperos nur komence de februaro, ĉar la poŝtostriko multe prokrastis la sendon de la antaŭa numero.
La 2a punkto de la tagordo estis la sliparoj pri la Normandaj Esperantistoj, kiuj trovi-ĝas ĉe Sro Lemarchand kaj Sro Gibaux, kaj estas nun tute pretaj. Ĉiuj, kiuj bezonas la liston povas peti ĝin ĉe Sro Lemarchand.
Poste oni diskutis la preparadon de la renkontiĝo en Val de Saâne. Ĝi okazos la 10/11an de Majo 1975 en la Domo de la Naturamikoj. Ĉiuj detaloj aperos en la Bulteno.
Por plifortigi la estraron, oni kontaktos "ŝlosilpersonojn":( Grupestrojn, ktp.) kiuj bonvolos kunlabori.
Pro la altiĝo de la prezoj, plialtiĝo de la kotizoj certe estos necesa. Nur la ĝenerala kunveno en Val de Saâne povos decidi pri tio.
Poste, la estraro decidis kolekti la gazetartikolojn pri Esperanto kaj mencii ilin en la bulteno. Oni decidis ankaŭ aperigi artikolojn pri U.N.E. en la bultenojn de diversaj asocioj (UFE, SAT, Fervojistoj, ktp.) kaj prepari agadon apud la ĝeneralaj konsilantaroj.
Fine, la estraro detale pridiskutis ĉiujn artikolojn de la unua parto de la projekto de novaj statutoj de UNE.
La fino de tiu diskuto okazos dum la venonta kunveno, kiu okazos ĉe Sro Lemarchand en Rouen, la 22an de februaro 1975, je la 14a horo.

---

## NIA VIVO EN ..............

YVETOT : La 9an de Novembro okazis en la Junuldomo ekspozicio pri la temo "Filatelio kaj folkloro per Esperanto" La filatelia parto de la ekspozicio montris multajn poŝt-stampoj, ktp; rilataj al Esperanto, el kiuj kelkaj estas maloftaj kaj grandvaloraj, apartenantaj al Sro CHAMARET el Saint Aubin les Elbeuf, kiu bonvolis mem prezenti sian kolekton. En la folklora parto troviĝis pupoj kaj diverslandaj objektoj senditaj de korespondantoj aŭ kolektitaj dum vojaĝoj eksterlanden. Dum la vizito, la publiko povis aŭdi folklorajn kantojn el multaj landoj kaj ankaŭ kantojn en Esperanto intermiksitaj kun franclingvaj komentarioj pri Esp. Proksimume 50 personoj, inter kiuj la prezidanto de la Filetalia Societo, vizitis la ekspozicion.

Post la ekspozicio malfermiĝis kurso por komencantoj gvidata de Sro POTTIER kun 4 gelernantoj. Ĝi okazas ĉiumarde vespere. La 15an de Decembro, okaze de la datreve-no de la naskiĝo de Dro Zamenhof, la grupo organizis manĝon en la restoracio de la Junuldomo. 20 personoj ĉeestis, kaj la etoso estis tre gaja.La 12an de Januaro, la grupo festos la Reĝojn posttagmeze en la restoracio de la Junuldomo.

LISIEUX : Malgraŭ informado en la ĵurnalaro kaj gluado de afiŝetoj, ni ne sukcesis estigi kurson en la Domo de Junularo kaj kulturo, tial Sino RAULT gvidas hejme 4 komencantojn kaj Sino MARTIN akceptas ĉe si 4 progresantojn.

Ni reprenis niajn periodajn renkontiĝojn; la lasta okazis la 15an de Decembro : Caen'aj kaj Lekzoviaj gesamideanoj tagmanĝis ĉe la restoracio " Au Bon Acceuil". Vigla esperanta zumado ekvekigis scivolemon de najbaraj kunmanĝantoj. Ni havis la plezuron konatiĝi kun elstara kaj vervoplena amiko, ĵus alveninta en CAEN, post multjara servado en Afriko; estas Sro Henri ROUSSEAU, kiu, de nelonge estis delegito de U.E.A. en BANGUI.

Posttagmeze, ni kunvenis en la Domo de Junularo, kie Sro TALPIED nin regalis per lumbilda promenado en Danlando, dum Sro PROVOST mastris la iom fantazieman projekciilon. La frue alvenanta noktiĝo signis la disiĝon. Ni antaŭvidas proksiman renkontiĝon la 26an de Januaro. C. MARTIN.

:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:

VIRE : Sro LEGRET informas nin, ke li gvidas esp-kurson al du liceaninoj (Termilale G) en la Junulara Domo ĉiun lundon je la 16a15. Granda estas la afableco de la Direktoro de la Junuldomo. La liceaninojn varbis Sro LEMAZURIER, profesoro pri angla lingvo, esperantisto. Sro LEGRET instruas per la "Junulkurso". Malgraŭ lia malbona sano, ni esperas ke nia amiko el Vire povos daŭrigi ĝis fine la kurson. Korajn gratulojn ! kaj bonan sanon !

:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:

ROUEN : La 21an de Decembro 1974 okazis en la urbodomo de ROUEN, la geedziĝo de Maryse MEUNIER el YVETOT (kiu siatempe zorgis kun multaj aliaj aktivaj geesperantistoj pri la SAT-Amikara Kongreso en Yvetot), kun Pierre LEMARCHAND el ROUEN. Do, nia bultena teamo pligrandiĝis kaj esperas aldoni por ne tre fora estonteco aliajn membrojn al tiu kvazaŭa familia redakt-komitato !

+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+

BONVOLU NOTI :

1)- En la venonta numero de N.E.B. kiun vi ricevos fine de Marto, vi trovos ALIĜILON pri la jara kongreso de U.N.E. en VAL de SAANE.

2)- Ni insiste petas vin rezervi la 10/11an de MAJO por persone partopreni la ĜENERALAN KUNVENON dimanĉe matene.

3)- Atentu : por voĉdoni por aŭ kontraŭ novajn statutojn (kiuj aperos en la venonta bulteno) laŭ la 21a paragrafo de la malnovaj, necesos ĉeesti persone la ĝeneralan kunvenon.

4)- Pro estrara baloto kiu okazos dum la Ĝenerala Kunveno en Val de Saâne necesas ke la personoj kiuj deziras kandidatiĝi, bonvolu kiel plej eble rapide skribi al la Prezidanto Sro QUILLAUD Pierre immeuble Côte d'Argent 2 avenue René Coty 76120 GRAND QUEVILLY.

5)- La venonta estrara kunveno de U.N.E. okazos sabaton la 22an de Februaro ĉe Sro Lemarchand en ROUEN je la 14a horo.

=-=-=-=-=

## LE HAVRE :

La Ĝenerala Kunveno okazis la 20an de Oktobro. Nia Prezidantino skizis la pasintjaran aktivecon de la Grupo :

Monataj Kunvenoj = regule vizititaj de la membroj, oni povis aprezi kelkajn specialajn aranĝojn ; ekzemple de S-ro Noel pri Geografio, de S-ro Laney pri vojaĝo al Hipanio, agrable prezentita kun lumbildoj , de S-ro Letailleux , kun sia vivoplena paroladeto . . .

Informado = Gratulojn al S-ro Chalm pro lia daŭra agado : li trafis sukcesan rezulton , aperigante duonpaĝan artikolon en la komerca bulteno " 60.000 " distribuata senpage en Le Havre kaj Regiono .

Kursoj = En la Junuldomo , kurso por komencantoj , en Liceo Porte Océane , konversacia kurso, ambaŭ sub gvidado de S-ro Chalm .

Ekzamenoj = Gratulon al F-ino Laurence Caron , kiu brile tra- -pasis la ekzamenon pri Supera Lernado .

Aktiveco kun eksterlandanoj = Krom nia amiko Laney , kiu kon- taktis Samideanojn en Hispanio , oni ne aŭdis pri vojaĝoj eksterlanden . Tamen, vesperaĵo kun Nederlandanoj estis interesa evento .

Financoj = nia Kasistino prezentas la kontojn : feliĉe , ili ekvilibriĝas ! Bone !

Estraro = S-ino Lavallée rezignas je sia posteno en la Komi - -tato : oni dankas al ŝi pro la longa deĵorado kaj laboro en la sino de la Grupo ; oni tamen rezervas ŝiajn kapablojn por perkoresponda kurso . Post baloto, estas elektitaj : Gesinjoroj Caron, Chalm, Gibaux, Laney, Langlois, Lucas, Mercier, Peltier, Turmel . Kun granda plezuro ni akceptas junan Grupaninon en la Komitaton : F-ino Sylvie Caron .

Ni devas memorigi pri sukceso kiun ni ŝuldas al nia Prezidan- tino S-ino Peltier : temas pri la "Saŭrkraŭtpartion " agrabla pro pluraj motivoj : plezuro revidi Samideanojn el aliaj urboj, stomaka regalo, distra flanko plejparte fare de Esperantanoj, kaj ankaŭ , valora eĥo en la gazetoj ...

Komitata Kunveno okazis la 31an de Oktobro ĉe S-ro Chalm . S-ino Peltier akceptis konservi la prezidantecan postenon, malgraŭ pezaj familiaj zorgoj, kondiĉe ke oni helpu al ŝi . S-inoj Turmel sekretariino, kaj S-ino Langlois, kasistino, denove deĵoros en siaj respektivaj postenoj dankon ! Projektoj :

- Preparo de la Zamenhof-tago
- Rekontakto de malnovaj membroj
- Planigo de la Monataj Kunvenoj
- Printempa kampanjo de informado ĉe la lernejoj

Monataj Kunvenoj : ni memorigas ke ili okazas dum ĉiu tria sabato de l'monato " Salle François 1er " je la 17a horo. Kutima pro- -gramo : 1) informoj 2) gramatika punkto 3) distra momento

Zamenhof-Tago estis festata la 14an de Decembro : niaj Grup- aninoj regalis nin per kukoj...nia amiko Laney kaj lia kolego mistifikis nin per siaj lertaĵoj...kaj niaj kantoj konkurencis la bruon de apuda salono!

Ni serĉas la Samideanojn kiuj perdiĝis en izoleco ! Se vi ren- kontas malnovajn membrojn, venigu ilin ! Memoru ke ĉiu povas refreŝigi sian konon de la lingvo; ĉu ĉe la monataj kunvenoj, ĉu ĉe la kursoj de S-ro Chalm : marde 19h 30 en la M.J.C. 2 Avenue Foch , aŭ vendrede 19h en la Licée de la Porte Océane

Urba Biblioteko : La Esperanto-libroj de la Prunta Sekcio taŭge cirkulas ; iom post iom , novaj titoloj estas disponeblaj .. ? Havranoj ! vi devas absolute pruntepreni librojn , kaj demandi pri alveno de novaj libroj, ktp . tio estas efika (kaj senpaga ) rimedo atentigi tiun Instancon pri Ni !

=-=-=-=-=-=-=-=-=

## LA NATURAMIKA MOVADO ......

Ĉu vi scias ke ĉiujare la membroj de naturamika movado gluas sur sian karton kotizmarkon sur kiu estas presita esperantlingve " la Naturamikoj" ?

Ĉu vi scias ke la bulteno de tiu movado havas regule esperantistan kro--nikon? Ĉu vi scias ke naturamikaj grupoj parolas nian lingvon kaj eldonas internacian esperantistan gazeton " LA MIGRANTO" ?

La naturamika movado estas internacia. Ĝi estas tre aktiva en Aŭstrio, en Svislando, en Germanio, en Nederlando, ktp; malpli en Francio. La naturamikoj kompreneble amas la naturon sed ili ne estas naturistoj. (Kvankam ekzistas naturista fako en la kadro mem de la asocio. n.d.l.r.) Ekzistas lokaj grupoj kies aktivaĵoj estas organizado de promenadoj en naturo, skiado, ekskursoj al montaro, naturaj sportoj, fa--rado de filmoj pri vojaĝoj, tendumado, folkloraj dancoj, ktp... Ili ankaŭ prizorgas pri domoj aŭ domegoj kiuj ebligas al junuloj pasigi libertempon en agrabla loko kaj malmultekoste. La domoj prizorgataj de naturamikoj povas esti pli aŭ malpli simplaj sed ĉiam puraj. Plej multaj en Francio estas la montaraj domoj en Vogezoj kaj Alpoj.

En nia provinco estas nur du domoj. En unu el ili, ni kunvenos la 10an kaj 11an de MAJO, ĉar la Naturamikoj disponigos sian domon dum du tagoj al esperantistoj konsiderataj kiel Amiko-movado.

Alvenante en Val de Saâne vi forlasos ĉefan vojon, dum unu kilometro vi veturos tra arbaro sur ŝtoneca mallarĝa vojo kiu kondukos vin al granda herbejo. Sur--voje, sovaĝaj kunikloj trairos la vojeton timante la bruon de via aŭtomobilo. En la fundo de la herbejo, vi subite ekvidos ĉarman tipe normandan farmodomon. Vi eniros en la domon kaj en la komuna ĉambro vi vidos kamenon en kiu estos bruligata ligno. Tabloj kaj benkoj estos ĉirkaŭ la kameno. Vizitante la domon, vi eniros diversajn dormĉambrojn tualetejon kun duŝo, kuirejon kun gasaparatoj kaj ĉiuj iloj necesaj kiel hejme por pre--pari manĝojn. Tiu domo estas prizorgata de Rŭena-grupo. La aktivuloj de tiu grupo estas eksmembroj de junulgasteja movado. La etoso de naturamika-domo ja similas tiun kiu ek--zistis antaŭ multaj jaroj en la junulgastejoj.

La 10an de Majo, ni aŭdos birdojn kanti, bovinojn bleki kaj esperantistojn babili. Eble, tio instigos vin pasigi viajn estontajn libertempojn en tiaj naturamikaj domoj.

Petro KIJO.

+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+

## SLIPARO de la NORMANDAJ ESPERANTISTOJ

Brave ! Respondoj al nia enketo ekatingas nin !

Spite al la fakto ke la Oktobra numero de la Bulteno suferis pro disdono-per--turbo, ni esperas ke ĉiuj nun ricevis ĝin....

Verŝajne vi jam resendis la "DEMANDARON", aŭ vi estas pretaj ĝin sendi...ne perdu minuton, metu tuj la respondon en la leterkeston....koran dankon al vi ĉiuj !

Dank'al tiu via kunlaborado, niavice ni devas " kuspi la manikojn" por pretigi taŭgan sliparon.

Tiu sliparo fariĝos la konsista bazo por ĉia estonta agado : ĝi permesos starigi planon kun celo de helpo al izolitaj samideanoj, aŭ grupoj en Normandio. Pensante "Normandio", ni konscias pri la kvin departementoj de nia provinco : nuntempe, kelkaj francaj administracioj aŭ Organismoj emas forlasi la ideon de "Granda Normandio", oni parolas pri"alta" aŭ "malalta" Normandio.....por ni, fidelaj je la devizo de U.N.E. ni konsideras Normandion kiel Tuto... kaj ni devos nepre direkti niajn zorgojn al la malpli favorataj departementoj !

Alia punkto de prilaborado por la venanta jaro estos la renoviĝo de la Statutoj ĉar ĉio evoluas, same la strukturo de nia Asocio bezonas adaptiĝon al la nunaj cirkons--tancoj. Kiu kontestos ke la vivo ne ŝanĝiĝis depost Majo 1947a, kiam U.N.E. estiĝis ?

Karaj Amikoj, ĉu vi ne opinias ke estas la taŭga momento por eldiri viajn opiniojn, ideojn, spertojn, sugestojn rilate al la Statutoj de nia Asocio ? Antaŭe ni dankas al ĉia propono pri plibonigo, konsiloj por eviti erarojn, ktp...

Pardonu tiujn liniojn iom tedaj : ili koncernas la internan organizaĵon de U.N.E. Sed, ni ĉiuj, Vi mem estas koncernataj !

+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+

/ ATENTU / : La kongreso de Unuiĝo Franca por Esperanto (U.F.E.) okazos ĉijare en TOURS la 28 / 31an de Marto. (Forstreku la informon kiu aperis en la lasta numero de N.E.B. pro malĝusta dato !)

# RADIO - ELSENDOJ

## Kapteblaj en Normandio.

| HOROJ | Dim. | Lun. | Mar. | Mer. | Jaŭ. | Ven. | Sab. |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 01.00/01.20 | – | – | – | – | – | – | Va.1 |
| 06.00/06.30 | Va.2 | Va;2 | Va.2 | Va.2 | Va.2 | Va.2 | Va.2 |
| 06.45/06.55 | Vi.2 | – | – | – | – | – | – |
| 09.30/09.55 | S 1 | – | – | – | – | – | – |
| 13.20/13.30 | – | B 2 | – | B 2 | – | – | – |
| 13.30/13.45 | – | – | – | Vi 1 | – | – | – |
| 16.30/17.00 | Va.3 | Va.3 | Va.3 | Va.3 | Va.3 | Va.3 | Va.3 |
| 17.45/17.55 | – | – | – | – | – | – | Vi 3 |
| 21.00/21.20 | R. | – | – | – | – | – | – |
| 21.00/21.30 | – | – | – | – | – | P. | P. |
| 21.05/21.30 | S 2 | – | – | – | – | – | – |
| 21.45/22.00 | – | – | – | S 2 | – | – | – |
| 22.30/23.00 | Va.4 | Va.4 | Va.4 | Va.4 | Va.4 | Va.4 | Va.4 |
| 22.45/22.55 | – | – | – | – | B 3 | – | B 3 |

En la ĉi-supra tabelo, vi trovu la ĉefajn radio-elsendojn kiujn oni povas okaze kapti en Normandio.
La horoj de dis-sendo indikas en kiu tago ĝi okazas : tie troviĝas "kodo". La suba klarigo de tiuj kodoj donas la nomon de la Stacio kaj ankaŭ la korespondantan ondo--longon. Ekz. : 13h30 Merkrede Vi 1 signifas ke ĉiumerkrede je la 13h30 oni povas kapti la Radio-Stacion de Vienne sur ondolongo 203 metroj.

**BERNE** : B 1 = 203 m.
B 2 = 75,28 m. - 48,66 - 31,46 - 19,60 - 19,44 - 16,86 - 13,94 m.
B 3 = 75,28 m. - 48,66 - 31,46 - 25,60 - 25,27 - 19,60 - 19,44 m.
Svisa Kurtonda Radio. Esperanto Fako. CH 3000 BERN 15. Svislando.

**PEKIN** : P = 43,00 m. - 33,25 - 31,25 m.
Radio Pekino. Esperanto Fako. PEKINO. Ĉinio.

**ROME** : R = 49,92 m. - 41,24 - 41,15 m.
Radio Roma. Esperanto Fako. Casella Postale 320. I. 00100 ROMA. Italio.

**SOFIO** : S 1 = 49,42 m.
S 2 = 50,61 m.
P. Radio Sofia. SOFIA. Bulgario.

**VARSOVIO** : Va 1 = 1.321 m.
Va 2 = 200 m. - 50,04 - 48,90 - 31,45 m.
Va 3 = 41,99 m. - 31,45 - 31,01 m.
Va 4 = 200 m. - 50,04 - 48,90 m.
Pola Radio. Esperanto Redakcio. Poŝtokesto 46. PL 00950 WARSZAWA Pollando.

**WIEN** : Vi 1 = 203 m.
Vi 2 = 48,74 m. - 41,38 - 13,83 m.
Vi 3 = 48,74 m. - 16,87 m.
Radio Wien. Esperanto Elsendo. Argentinierstr. 30a. A. 1041. WIEN Aŭstrio.

- Krome : NATAL, MURIBITA, SOROCABA, RIO de JANEIRO el Brazilo.
GDANSK el Pollando
BRATISLAVA el Ĉekoslovakio
ZAGREB el Jugoslavio
TALLINN el Estonio

- BILBAO , SABADELL , VALENCIA , el Hispanio,

elsendas en la internacia lingvo ESPERANTO;

(Sekvo)

# - 1975 - TURISMA KALENDARO.

Planu jam viajn venontajn feriojn kaj elektu !

| | | | |
|---|---|---|---|
| - JANUARO - | + 4 - 8 | . la Novzelanda Kongreso en Christchurch. Novzelando | .14 |
| | + 26 -2/02 | . Skisemajno en Maria Alm. Aùstrio. | .15 |
| - FEBRUARO - | + 1 - 6 | . Vintra Esp. Semajno en Pamporovo. Bulgario. | .16 |
| | + 8 - 15 | . Skisemajno apud Linz. Aùstrio. Maria Alm. | .17 |
| | + 6 - 15 | . 2a Internacia Vintra Junulara Esp. Feriado. Inowroclaw. Pollando. | .18 |
| | + 17 - 23 | . Semajno de Internacia Amikeco. | .19 |
| - MARTO - | + 16 - 19 | . Junulara Seminario."Komunikado, socia organizado" Milano. | .20 |
| | + 22 | . Generala Kunveno de Fédération Espérantiste du Travail. Paris. | .21 |
| | + 23 | . Federacia Kongreso Centro Okcidenta UFE. Grésillon. | .22 |
| | + 22 - 29 | . Renkonto de junaj esperantistoj en Grésillon. | .23 |
| | + 29 - 31 | . Kongreso Argentina Esp. Junularo. Tukuman. Argentinio. | .24 |
| | + 29 - 31 | . Kongreso de SAT-Amikaro en St Junien Hte Vienne. | .25 |
| | + 30 -5/04 | . Staĝo en Grésillon "Praktiko kaj esprimado". | .26 |
| - APRILO - | + 4 - 6 | . Jarkonferenco de SATEB (SAT en Britio) Swanwick.Britio. | .27 |
| | + 4 - 6 | . Lingvistika Simpozio en Zagreb. Jugoslavio. | .28 |
| | + 25 - 27 | . Printempa Junulara Renkontiĝo en Venecio. Italio. | .29 |
| | + 26 - 27 | . Semajnfino de Naturamikoj en Godinne apud Namur. Belgio. | .30 |
| - MAJO - | + 3 - 4 | . Int. Markola Esp. Renkontiĝo Boulogne sur Mer. | .31 |
| | + 3 - 4 | . Trilanda Esp. Renkontiĝo en Weert. Nederlando. | .32 |
| | + 17 - 19 | . Sveda Jarkongreso en Halmstadt. Svedio. | .33 |
| | + 23 - 26 | . Maja Renkontiĝo en Plzen. Cekoslovakio. | .34 |
| - JULIO - | + 1 - 21 | . Esperantistaj Semajnoj Grésillon. | .35 |
| | + 4 - 6 | . 20a Kongreso Jugoslavaj Esp. en Cakovec. Jugoslavio. | .36 |
| | + 13 - 26 | . 24a Somera Esp. Tendaro. Lanĉov. Cekoslovakio. | .37 |
| | + 15 - 26 | . De Budapeŝto ĝis Nigra Maro per ŝipo. | .38 |
| | + 16 - 27 | . 5a Jubilea Esp. Feriado en Miedzyzdroje. Pollando. | .39 |
| | + 19 - 26 | . 31a Int. Junulara Konferenco. Fredericia. Danlando. (Forstreku la numeron 13an de la lasta numero de N.E.B.) | .40 |
| | + 18 - 22 | . 35a Hispana Esp. Kongreso en Lerida. Hispanio. | .41 |
| | + 19 - 26 | . Kongreso de KELI (Kristanoj Evangeliaj) Jônköping. Svedio | .42 |
| | + 19 - 25 | . Antaùkongreso de SAT en Haarlem. Nederlando. | .43 |
| | + 20 - 26 | . Int. Feriaj Esp. Kursoj en Helsingør. Danlando. | .44 |
| | + 20 - 26 | . 43a Intern. Kongreso de Blindaj Esp. Hillerød. Danlando. | .45 |
| | + 22 -11/08. | Internaciaj Semajnoj. Grésillon. | .46 |
| | + 26 - 2/08. | 15a Int. Infana Kongreseto. Hellerup. Danlando. | .47 |
| | + 27 -10/08. | 24a Somera Esp. Tendaro en Lanĉov. Cekoslovakio. | .48 |
| - AÙGUSTO - | + 2 - 9 | . Post-Kongreso de SAT en Hengelo. Nederlando. | .49 |
| | + 3 - 9 | . Post-Kongreso de UEA en Aarhus. Danlando. | .50 |
| | + 3 - 10 | . 21a.Int. Esp. Feriosemajno en Krommenie. Nederlando. | .51 |
| | + 3 - 23 | . Restado de Fed. ESP. travail en Oberhof. Germ. Dem; ResP. | .52 |

## – TURISMA KALENDARO (Sekvo).

| | | | |
|---|---|---|---|
| – AÙGUSTO – | + 11 – 16 | . Int. Kongreso de la Katolikaj Esp. (IKUE). Romo. Italio. | .53 |
| | + 13 – 19 | . 46a Itala Kongreso de Esp. en Triesto. Italio. | .54 |
| | + 1( – 17 | . Kongreso de la Esp. Ligo de Nordameriko. Brattleboro. | .55 |
| | + 12 –1/09 | . Studsemajnoj en Grésillon. | .56 |
| | + 12 –2/09 | . Restado de Fed. Esp. travail en Diensdorf. Germ. Dem. Resp. | .57 |
| | + 31 –6/09 | . 16a Eùropa Feriosemajno de Svisa Asocio de Esp. Fervojistoj Vierwaldstätter-lago. Svislando. | .58 |
| – SEPTEMBRO – | + 27 – 28 | . Ĝenerala Kunveno de la Francaj Fervojistoj en Epernay. | .59 |

..............

Ne forgesu la internacian somerumejon Primošten kaj Grésillon.
Aliaj listoj aperos en la venonta bulteno de U.N.E.
Por havi kontakt-adresojn pri tiuj renkontiĝoj skribu al
Petro Lemarchand 43 rue Desseaux 76100 ROUEN.

---

## – KELKAJ UTILAJ ADRESOJ. (Sekvo)

– 18 – FRANCA ESPERANTO INSTITUTO. (Ekzamenoj – Diplomoj). UFE-SAT Amikaro.
ĉe Sino VINCENT rue des Oiseaux 27700 Les Andelys.

– 19 – KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA. (KELI).
Franca sekcio. Sro André BACHELIER, 6 impasse des Maronniers 93600 Aulnay sous Bois. Tel.:(1) 929 28 04. c.c.p. : 4521 14 Paris.
Oficiala organo : La Ponteto.

– 20 – SKOLTA ESPERANTISTA LIGO. Franca Sekcio.
Sro Patrick DEVEUGHEIE. Résidence de Rigny (app;64) 94360 Bry sur Marne.

– 21 – INTERNACIA ESP. KLUBO AUTOMOBILISTA (IEKA) Landa delegito. :
Sro GUILLAUME Pavillon 66 Résidence de Grasse. 78810 Feucherolles.
Dumviva kotizo : 6,00 FF. 1,00 FF por gluebla veturila marko.

---

## – KOTIZOJ ABONOJ POR 1975 :

– UNUIĜO de La NORMANDAJ ESPERANTISTOJ : Minimume: 3,00 F. Subtenkotizo ekde 10,00 f; Union des Espérantistes de Normandie c.c.p. 283 40 H.

– FEDERATION NORMANDE des CENTRES CULTURELS ESPERANTO : (Normanda Federacio UFE)

| | malpli ol 22- jara | Pli ol 22- jara |
|---|---|---|
| a) membrokarto UFE-UEA + Espéranto-actualités + Normanda Stelo. | 9 F. | 9 F. |
| b) kiel a) + Revue Française | 42 F. | 60 F. |
| c) kiel b) + Jarlibro. | 64 F. | 104 F. |
| ĉ) kiel c) + Esperanto + Kontakto. | 108 F. | 148 F. |

c.c/p. Rouen 2348 06 C.

– SAT – AMIKARO
20,00 F. André SADIER 22 Avenue P.V. Couturier Bât. N.D. 93000 Bobigny.
c.c.p. : 7658.05 Paris.

– SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (S.A.T.)
44,00 F. – 53,00 F. kun Sennacieca Revuo. SAT 67 Avenue Gambetta 75020 Paris
c.c.p. Paris 123422.

– FEDERATION ESPERANTISTE du TRAVAIL. (F.E.T.)
15,00 F. F.E.T. 179 rue Ordener 75018 Paris. c.c.p. : 902 52 Paris.
15,00 F. Abono al PACO gazeto de Mondpaca Esperantista Movado.

– Por la aliaj fakaj asocioj, bonvolu skribi al la asociaj adresoj (Vidu la lastan bultenon de U.N.E. : " Kelkaj utilaj adresoj".

# LIVRES D'ETUDE ACTUELLEMENT EN VENTE

Veuillez consulter le numero 29 de N.E.B. qui vous donnera tous les renseignements utiles concernant les services de librairie des différentes associations Espéran--tsstes. Les prix ne sont donnés qu'à titre indicatif. La suite de cette étude pa--raitra dans les prochains numéros de Normanda Esperanto Bulteno.

| | 1 | | 2 | 3 |
|---|---|---|---|---|
| TITRE : | Premier Manuel de La Langue Auxiliaire Espéranto. | - d°- Corrigés des Exercices | Nos Premiers Pas en Espéranto. - | Je parle Espéranto |
| AUTEUR : | - | - | André Ribot | Jean Thierry |
| EDITEUR : | Librairie Centrale Espérantiste | Librairie Centrale Espérantiste | Editions Françaises d' Espéranto | Marabout Flash |
| EDITION : | 1962 | 1962 | 1968 | 1972 |
| FORMAT : | 10 x 15 Broché | 9,5 x 14,5 Broché | 11 x 17,5 Broché | 11,5 x 11,5 Broché |
| PAGES : | 32 | 16 | 36 | 162 |
| LECONS : | 9 +lexique esp.-Fr. | 9 | 34 paragraphes | 14 + 28 +Voc. Fr.-Esp. |
| METHODE : | Grammaticale | Grammaticale | Grammaticale | Directe + Gramm. |
| NIVEAU : | 1er Manuel | 1er Manuel | Ier Manuel | 1er Manuel |
| ELEVES : | Adultes + jeunes | Adultes + jeunes | Adultes + jeunes | Adultes + jeunes |
| PRIX : | 2,50 F. | 1,50 F. | 3,00 F. | 4,50 F. |
| REMARQUE : | Chez tous les Libro Servoj. Seulement pour donner un aperçu de la langue. | Corrigé du précé--dent. | Vendu avec 1 disque flexible, 45 T. 17cm. - d°- | Dans toutes les librairies.Manuel d'initiation pour l'autodidacte. |

| | 4 | 5 | 6 | 7 |
|---|---|---|---|---|
| TITRE : | ESPERANTO MANUEL INITIATION | ESPERANTO MANUEL ETUDE | ESPERANTO MANUEL PERFECTIONNEMENT | NI PAROLU EN ESPERANTO |
| AUTEUR : | Bernard Thaillet. | Jean Couteaux | Jean Couteaux. | André Ribot |
| EDITEUR : | Editions NOVA. | Edition NOVA. | Editions NOVA | Edit. Franç. Esp. |
| EDITION : | 1955 | 1955 | - | 1960 2è Edition |
| FORMAT : | 11,5 x 17,5 Broché | 11,5 x 17,5 Broché | 11,5 x 17,5 Broché | 12 x 15,5 Broché |
| PAGES : | 64 | 128 | 96 | 160 |
| LECONS : | 6 | 18 +Voc. Esp.-Fr;F.E. | 21 | 13 + Voc. Esp.-F.E.-F |
| METHODE : | Grammaticale | Grammaticale | Grammaticale | Grammaticale |
| NIVEAU : | Ier Manuel | Manuel de base. | Perfectionnement | Manuel de base. |
| ELEVES : | Adultes + jeunes | Adultes + jeunes | Adultes + jeunes | Adultes + jeunes. |
| PRIX : | 2,50 F. | 5,50 F. | 5,00 F. | 5,00 F. |
| REMARQUE : | UFE / UEA. Manuels classiques, mais présentation fort peu attrayante. Encore quelques exemplaires sur le marché. | UFE / UEA | UFE / UEA | Corrigés des exer--cices sur feuilles volantes.(12). Petit Manuel complet grâce aux corrigés. |

# LIVRES D'ETUDE ACTUELLEMENT EN VENTE.

( Suite ) 2.

(Les prix ne sont donnés qu'à titre indicatif.)

:-:-:-:-:

| | 8 | 9 | 10 | 11 |
|---|---|---|---|---|
| TITRE : | L' ESPERANTO SANS PEINE. | ESPERANTO MANUEL | INITIATION PRATIQUE et THEORIQUE à la LANGUE INT. ESPERANTO | JUNULKURSO |
| AUTEUR : | Jean Thierry | Chavet et Warnier | Dr. Pol Denoël | - |
| EDITEUR : | ASSIMIL | U. F. E. | Sonorilo. Belgique | SAT- Amikaro |
| EDITION : | 1973 | 1961 70è mille | 1970 4è Edition | 1961 3è Edition |
| FORMAT : | 11,5 x 18 Relié | 11,5 x 18 Broché | 14 x 21,5 Relié | 15,5 x 24 Broché |
| PAGES : | 430 | 184 | 110 | 92 |
| LECONS : | 98 Appendice gramm. Index alphabétique | 15 Lexique Fr.-Esp. et Esp.-Fr. | 11 Lexique Fr.-Esp. et Esp.-Fr. | 20 + Grammaire + exercices |
| METHODE : | Directe | Grammaticale | Grammaticale | Directe |
| NIVEAU : ELEVES | Adultes + jeunes | Adultes + jeunes | Adultes + jeunes | Excellent pour enfants.Non conseillé pour adolescents. |
| NIVEAU : | Manuel de base | Manuel de base | Manuel de base | Ier Manuel + de base |
| PRIX : | 27,00 F. | 9,00 F. | 12,00 F. | 10,00 F. |
| REMARQUE : | Méthode vendue seule ou avec 16 disques 33T.17cm. 248,00 F. 4 cassettes ou 4 bandes 240,00 F. | Méthode classique 70è mille ! mais à la présentation peu attrayante. U. F. E. | Excellent premier manuel. Clair et concis. U. E. A. | Complété par 5 dis-ques sŭples 33 T. 17cm. Prix 15,00 F. Existe également en Portugais et Suèdois |

| | 11 bis | 12 | 13 | 14 |
|---|---|---|---|---|
| AUTEUR : TITRE : | JUNULKURSO Suplemento. | L' ESPERANTO VIVANT | ESPERANTO FACILA POR VI. | NOUVEAU COURS RA-TIONNEL et COMPLET d' ESPERANTO; |
| AUTEUR : | - | Pierre Delaire | C. Walter | Habert - Boubou. |
| EDITEUR : | SAT - Amikaro | Centre National Espéranto Office | Editions NOVA | SAT - Amikaro |
| EDITION : | 1963 | 1965 | 1960 | 1973 |
| FORMAT : | 15,5 x 24 Broché | 15,5 x 22 Relié | 15 x 20,5 Broché | 15 x 20,5 Broché ou Relié. |
| PAGES : | 24 | 352 | 120 | 184 |
| LECONS : | 20 | 12 Appendice 86 pages Voc. Fr.-E. E.-Fr. | - index alphabétique. | 18 |
| METHODE : | Supplément au | Directe + Grammat. | Directe | Grammaticale |
| NIVEAU : ELEVES : | précédant enfants | Base + perfectionne. Jeunes + Adultes | Manuel de base Enfants + jeunes | Manuel de base adultes |
| PRIX : | 3,00 F. | | | 16 F.Broché.28 F. relié |
| REMARQUE : | Existe en version Anglais Espagnol Néerlandais | Très complet mais présentation confuse. Nlle édition en réimpression | Excellente méthode directe.Quelques exemplaires sur le marché. | Excellent manuel de base. 95000 exempl. à ce jour ! |

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## SENPAGE HAVEBLAJ :

- LOT : La pola flugkompanio uzas Esp. Nun ĝi ankaŭ eldonis notkajeron kun Esp.-teksto kiu estas senpage havebla ĉe Polaj aerlinioj LOT Sr. Grjecka 17 Varsovio.Pol-lando. Mendu ĝin kaj ankaŭ la aliajn Esp. eldonaĵojn de LOT.

- TOURS : "La ĉefurbo de Turanĝio": esperantlingva folio aldonita al la francling-va faldfolio pri tiu franca regiono. Ricevebla kontraŭ poŝtmarko de Office de Tourisme Place de la Gare 37000 TOURS.

- ROSTOCK 1974 : Kolorilustrita faldfolio havebla ĉe Rostock Informejo Lange Str. 5 25 Rostock. Germana Demokratia Respubliko.

- POLLANDO NOMBROJ kaj FAKTOJ : Broŝuro, senpage ricevebla de Pola Radio, Esperanto Redakcio Pk. 46 , PL 00 950 Warszawa 1.

- 750 JAROJ de OPAVA : Du bildkartoj pri la muzeo de militoperacio ĉe Ostrava kaj faldfolio riceveblaj de Esp. Rondeto de UK. Ostroj, Narybničku 43, OPAVA.Ĉekoslovakio.

- LIBRO-KATALOGO de Dansk Esperanto Forlag ilustrita, senpage havebla ĉe Dansk Esp. Forlag, Ingemannsvej 9 , 8230 Abyhøj. Dan-lando.

- AUSTRALIO, KONCIZAJ FAKTOJ.: ilustrita broŝuro senpage havebla de Aŭstralian Mission to the United Nations, 1 Dag Hammarskjold Plaza, New York, N.Y. Usono. (Ekde aprilo 1975.)

- GOTENBURGO : Senpaga informilo. Mendu ĝin de Oficejo de Turismo, Parkgatan 2, S.41138, Gotenburgo, Svedio.

- ARHUS . : Turisma prospekto. Turistoficejo Urbodomo, DK 8000 ARHUS C Danlando.

- HAMBURGO : Turisma faldfolio. Fremdenverkehrszentrale Hamburg. 2000 Hamburg 1 . Bieberhaus. Fed.Germ.Resp.

## ĈU VI SCIAS KE ... ?

- DONACO de RADIO WIEN . Kiu almenaŭ kvinfoje skribas al Radio Vieno Kurtonda Servo, ricevas senpage Esperanto-diskon, nome "El Esperantujo" kun recitaĵoj de Philipp Zeska, Burgteatro Vieno. Skribu do, kaj vi baldaŭ ricevos la donacon. Radio Wien. Esperanto elsendo. Argentinierstrasse 30a A. 1041. WIEN Aŭstrio.

- AUTOBUSA KARAVANO al Universala Kongreso de U.E.A. en Kopenhago. per privata aŭtobuso por 40 personoj. Pli detale informas la interesiĝantojn U.F.E. 4bis rue de la Cerisaie 75004 PARIS. Tel. (1) 278 68 86. La grupo tranoktos survoje interalie en Rotterdam.

=-=-=-=-=-=-=

## ĈU VI SCIAS KE ... ?

- La 18an de Decembro 74, la guberniestro de la brazila federacia ŝtato SAN PAULO proklamis novan leĝon laŭ kiu 15a de decembro estas proklamita TAGO de la INTERNACIA LINGVO ESPERANTO. La nova festotago estas "manifestota ĉiujare je la 15a de decembro naskiĝa datreveno de la pola kuracisto kaj lingvisto ZAMENHOF." Laŭ Esperanto Revuo.

- Unuafoje en Pollando KAFEJO ESPERANTO en Szczecin ĉe la strato Wyzwolenia 85 kore invitas ĉiujn esperantistojn ĉiutage inter la horoj 10 - 23a.
Laŭ Heroldo de Esperanto.

- POLA ESPERANTO ASOCIO havas 4500 membrojn sed oni taksas laŭ la venditaj lernolibroj ke minimume 80 000 personoj en Pollando sin okupas pri Esperanto. Mil homoj partoprenas la korespondan kurson de Pola Esp. Asocio. Laŭ Pilo-Press.

- La 1an de Septembro 1889 aperis en Nuremberg la unua gazeto en la Internacia Lingvo, nome "la Esperantisto". Do la Esp. gazetaro estas pli ol 85 jara.

- En 1973 en Francio aperis pli ol 1400 artikoloj kaj informoj pri Esp. Okazis ankaŭ 30 radio kaj 9 televiddissendoj pri la sama temo. Laŭ Heroldo de Esperanto.

- La PARIZAJ ESPERANTISTOJ kunvenas ĉiuĵaŭde en historia plena kvartalo : La Marĉo, apud la placo de la Bastille ĉe : " MA BOURGOGNE" 19 place des Vosges Paris 4

- La libro de Alberto Fernandez "senĝenaj Dialogoj" originale verkita en Esp., aperis en Franclingva traduko ĉe la pariza eldonejo "La Pensée Universelle" sub la titolo " Dialogues Insolites, Excursions délirantes au coeur de la science."

- La skriba uzo de lingvoj ĉe 315 kongresoj estis la jena : la angla estis utiligita en 298 kongresoj, la franca en 266, la germana en 157, la hispana en 61, la rusa en 16, la itala en 13, la portugala en 9, la sveda en 8, Esperanto en 6, la nederlanda en 6.
(Laŭ analizo farita de la Unuiĝo de la Internaciaj Organizaĵoj.)

- La Eŭropa Centro por Kulturo kaj Edukado eldonas gazeton en Esperanto : "Eŭropa Dokumentaro" kiu aperas 4 foje jare (po dudek paĝoj).
Kostoj : 9 svisaj Frankoj. Adreso : 122 rue de Lausanne, 1212 Genevo.Svislando. Poŝtĉirkonto : 12-17258.

- la 1an de Oktobro 1924 aperis la unuan numeron de SENNACIULO . Ĝi estas 50-jara !

=-=-=-=-=-=-=-=

NE FORGESU VIAN JARAN KOTIZON
AL U.N.E. : 3,00 F. minimume !

## NI RICEVIS :

— INTERŜANĜE de NIA BULTENO :

- nº 7 . 8 . 9 .an de "KOMUNA INFORMILO k. esprimilo por la lokaj grupoj de SAT-Amikaro kaj la izolitaj esperantistoj en Akvitanio". kun interalie interesa artikolo pri Albanio kaj aktualaĵoj pri la esp. vivo en tiu regiono.
La prizorganto de tiu bulteno ankaù eldonas broŝurojn kun originalaj tekstoj, tradukoj, prelegoj. Temas pri la Broŝurservo de la "Juna Penso". Mendu la liston de la disponeblaj broŝuroj al : La Juna Penso 47340 Laroque Timbaut.
C.C.P. : 3 374 04 M , Bordeaux.
- nº 308 an de "ESPERANTO FERVOJISTO" Organo de la Franca I.F.E.F. Sekcio. Printempa Kunveno de la Francaj Fervojistoj okazos en Les ANDELYS la 15/16an de Marto 1975 samtempe kiel la federacia kongreso de U.F.E.
En ĝi oni povas legi artikolon pri la venonta kongresurbo VILLACH kie kongresos I.F.E.F. ĉijare.
- nº 53an de SUPLEMENTO al PACO eldonita de FEDERATION ESPERANTISTE du TRAVAIL; kun novaĵoj pri esp. en la sindikataj medioj kaj informoj pri restadoj en Germana Demokratia Respubliko.
- Informilon (Januaro 75) EL CENTRO-OKCIDENTA FEDERACIO "ESPERANTO" Federacia kongreso okazos en Grésillon la 23an de Marto.
- nº 302an de "LA PARIZANO" Organo de la Pariza grupo de SAT-Amikaro. kun informoj pri la venontaj naturamikaj aktivecoj. Por havi precizajn sciigojn, skribu al Sro LEBEC 10 rue Jean Mermoz 94340 Joinville le Pont.
- Cirkuleron nº5 de "NORMANDA STELO" Organo de la Normanda Federacio de U.F.E. En ĝi estas tre interesa artikolo pri : "Milionoj el niaj samlandanoj nenion scias pri Esp. KIES KULPO".... Aperis la provizora programo de la normanda federacia kongreso de U.F.E. kiu okazos en Les ANDELYS la 15/16an de Marto
Korespondadreso : Sro GRAFFIN 10 av. Victor HUGO 27700 LES ANDELYS.
- Perleterajn informojn pri la vivo en THIERS de la esperantista grupo gvidata de Sro DESSAPT. Gratulojn al li por la aktiva laboro jam farita ! Aldone li sendis longan gazeteltranĉaĵon kun foto de " La Montagne Centre France."

— GAZETELTRANĈAĴOJN el :

- " PAYS D'AUGE" 15/10/74. kun informoj pri malfermo de kurso en LISIEUX.
- " LE 60.000" nº41a Tutpaĝa artikolo pri nia lingvo dank'al Sro CHAIM.Dankon al nia amiko kiu sukcesis aperigi tiun informdokumenton en tiu multlegata Havra gazeto.

— VIA BULTENISTO, dankas por ĉiuj ricevitaj leteroj pri la Statutaj problemoj, Agad--plano 1975/76, por la respondoj al la Demandaro pri la sliparo de la Normandaj Esperantist(in)oj, por la sendo de novaj adresoj por ke tiuj personoj povu ricevi nian modestan bultenon, kaj por bondeziroj pri la nova jaro. Li petas pardonon pro ne sufiĉe da libera tempo por persone respondi al ĉiu.

## INTER NI ...

- Dank'al ESPERANTO FERVOJISTO ni scias ke Sro COLLEU en VIRE emeritiĝis la 2an de Decembro 1974. Tutfeliĉan emeritecon al nia amiko !
- Ni bonvenigas inter ni Sron ROUSSEAU nova U.E.A. delegito kaj fakdelegito en CAEN; Li estis antaùe delegito en BANGUI (Centraafrika Respubliko).
Ni esperas ke li sukcesos reveki la Caen'an grupon kiu estis unu el la plej aktivaj antaù pluraj jaroj.
- En Nonancourt, forpasis la 12an de julio la direktoro de la Sekcio pri la Teknika Vortaro de la Akademio de Esperanto, inĝeniero Auguste BROISE; Por la tuta esperantista movado kaj ĉefe por ni estas perdo nekompensebla.

+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+

Tiu-ĉi bulteno estis eldonita de la esperanto-grupoj en ROUEN kaj GRAND QUEVILLY.
Prizorgis la banderolojn kun la adresoj, kaj la Havra stencilo Sro GIBAUX el Le Havre.

Polycopié par le Groupe Espérantiste Havrais. DEPOT LEGAL : 4éme Trimestre 1974.
La gérante : N. PELTIER.